(La supereco de la frazon-post-fraza traduko kompare al la prezentado en fremda instrulingvo estas iom pli granda ol kalkuliĝas el [3b], se oni konsideras, ke dum tiu instruado la lernanto, aŭdadante instrulingvajn frazojn kaj senpere poste iliajn tradukojn, plibonigas siajn konojn de la instrulingvo, tiel ke kreskas $r = r(P[t]) = r(1-U[t])$ konforme al [2]. Tial validas anstataŭ [3b] laŭ [1a,b] pli ĝenerale

[3c] $$u(D) = u(0)e^{-0,5\int_0^D (r[P\{t\}]+1)\lambda dt}$$

La laŭkvanta rezulto tamen estas preskaŭ la sama kiel laŭ [3b], ĉar oni devas supozi por la kalkulo de $P[t] = 1-U[t]$ laŭ [1] aŭ [1b] malaltan lernfacilecon $\Lambda = \lambda(L)$ de la instrulingvo dum tiu necelita „lingvoinstruado", tiel ke dum la tradukata kurso U kaj P, sekve r, restas preskaŭ konstantaj. Nur se la instrulingvo estas tiom facile lernebla kiom estas ILo, aŭ se la daŭro D de la kurso estas tre granda, indas konsideri la ĝeneraligon [3c].)

2.3 *Pliboniga vojo b: La utilo de lingva preparkurso*

Se oni antaŭmetas preparan kurson kun daŭro T pri la instrulingvo, ja kreskas la kompetenteco pri ĝi al $P(T)$, sekve la lernfacileco de la posta precipa kurso al $r(P[T])\lambda$, sed restos por ĉi tiu nur la tempo $D-T$. Tial la restanta nekompetenteco estas kalkulenda ne laŭ (2) sed laŭ

(4) $$u(D) = u(0)e^{-r(P[T])\lambda(D-T)}$$

Ĉi tiu rezulto estas kompare kun (2) malpli granda (la lingva preparkurso do utila) nur se

(5) $$r(P[T])(D-T) > r(P[0])D$$

Se la instrulingvo estis komence komplete nekonata, do $r(0)=0$, tiam por $0<T<D$ la kriterio estas kompreneble ĉiam plenumita, kaj oni povas kalkuli la optimuman tempoinveston T el empirie mezurenda $\Lambda = \lambda(L)$ kaj taŭga teorio pri la funkcio $r(P)$. Ankaŭ se la instrulingvo estas komence iomete jam konata, kiel kutime la angla lingvo kaj ne malofte ILo, lingva preparkurso povas esti utila, sed nur sub la kondiĉo, ke la instrulingvo estas tiom facile lernebla kaj ankoraŭ tiom malbone regata, ke ekzistas preparkurstempo $T<D$, dum kiu la kresko $r(P[T])-r(P[0])$ fariĝas sufiĉe granda.

2.4 *La relativa utilo de lingva preparkurso kompare kun traduko.*

Komparo de (4) kun (3b) ebligas respondi al la demando, ĉu (a) tradukado de la kurso en la pensadlingvon de la lernantoj estas pli aŭ malpli efika ol (b) antaŭmeto de kurso pri la instrulingvo. Eĉ se ne necesas konsideri la kostojn de la instrusistemo - dum la tempo D ja estas laborantaj kaj tial eble pagendaj laŭ (a) ĉiam *kaj* docento *kaj* tradukanto, laŭ (b) ĉiam nur *unu* instruanto - la vojo (b) estas preferinda, ĉar ĝi kondukas al pli bona rezulto ol (a), se (sendepende de la lernfacileco de kaj la antaŭkonoj pri la instruaĵo!)

(6a) $$r(P[T])(D-T)>0{,}5(r[P\{0\}]+1)D$$

do

(6b) $$r(1-U[0]e^{-\Lambda T})(D-T)>0{,}5(r[1-U\{0\}]+1)D$$

Se la lernantoj dekomence konas la instrulingvon (preskaŭ) sambone kiel sian pensadlingvon, tiel ke $U(0)$ kaj la tempo T uzinda por pliperfektiĝi estas (preskaŭ) 0, tiam evidente la rezulto de ambaŭ vojoj estas (preskaŭ) la samo, ĉar tiam (preskaŭ) egalas, ĉu oni ripetas en la instrulingvo aŭ per traduko. Se inverse la instrulingvo komence (preskaŭ) komplete estas nekonata, t.e. se $U(0)$ estas (preskaŭ) 1, tiam la maldekstra flanko de (6a,b) superas la dekstran - t.e. preparkurso estas pli efika ol tradukado -, kondiĉe ke la produto ΛT estas sufiĉe granda spite (relative al D) mallongan preparkursdaŭron T - se do la instrulingvo estas facile lernebla. El (6a) evidentiĝas, ke - sendepende de la antaŭkonoj pri la instruaĵo kaj pri la instrulingvo - post sufiĉe mallonga preparkurstempo T la lernfacileco de la precipa instruado devas sufiĉe eksuperi la aritmon de la lernfacilecoj de kurso farita per la pensadlingvo kaj de kurso farita en L sen plibonigo de ties antaŭkonoj. Se oni konas la funkcion r (plej simpla supozo:$r[P]=P$), tiam la optimuma tempoinvesto T estas kalkulebla depende de $U(0)$, Λ kaj D.

2.5 *Konkludoj el mezuradrezultoj de empiriaj parametroj*

Por la lernfacileco λ validas (Frank, 1976a, p.42)

(7) $$\lambda = \frac{\eta C_V}{I}$$

kie I estas la informacio de la lernenda instruaĵo, C_V la lernrapideco kaj η la efikanco, t.e. la procentaĵo de la lernkapablo uzita dum la tempounuo por lerni instruaĵinforma-

cion. Tio ebligas proksimuman kalkulon de la lernfacileco de ILo, kiu tamen dependas de diversaj supozoj, tiel ke la literaturo (vd. la koncernajn tekstojn reprezitajn en Barandovská, 1993a,b!) havigas diversajn rezultojn.

La efikanco η varias laŭ la instrusituacio inter pli ol 0,3 (tradicia rekta instruado al klasoj aŭ per universitataj lekcioj) kaj ĉ. 0,8 (programita, aŭdvida instruado). (Vd. Barandovská, 1993a, pj. 106, 177, 367 ktp.; 1993b, pj. 635, 763 ktp.)

La lernrapideco fare de studentoj kaj aliaj sufiĉe junaj plenkreskuloj estas por la provizora memoro (sufiĉa kaze de densa instruado dum proksimume 20 studhoroj kaj tuja aplikado, tiel ke forgesado ankoraŭ estas preteratentebla) mezume $C_v = 0,7$ bitoj/sekunde. (Por junuloj kaj olduloj kalkulendas per malpli alta lernrapideco; vd. ekz. Barandovská 1993a, p. 363, 1993b, p. 755.)

Ankaŭ la kalkulrezultoj pri la instruaĵinformacio I de ILo varias laŭ la kondiĉoj. I = 70.000 bit (Barandovská, 1993a, pj. 107, 122, 141; 1993b, p. 766) estas por la kazo de lingvaj preparkursoj iom tro alta valoro. Por bona kompreno ja sufiĉas akiri pasivan konon de proksimume 2500 radikoj kun mezume malpli ol ld 2500 bitoj da semantika informacio, t.e. ĉ. 11 bitoj en unu radiko. Studentoj el ĝermanaj lingvoregionoj tuj rekonas ĉ. la duonon de tiu sufiĉa provizo, studentoj el latinidaj lingvoregionoj eĉ ĉ. 70%n. De radiko, kies rekono ankoraŭ estas lernenda, la sintaktika informacio kalkuliĝas je 4 bitoj por la unua litero plus 2 por la dua plus po 2,5 por ĉiu sekvanta (vd. Barandovská, 1993a, pj. 463, 470); ĉar la mezuma longeco de la lernendaj, ne tro specialaj radikoj estas inter 5 kaj 6 literoj la mezuma sintaktika informacio de radiko tiel kalkuliĝas je ĉ. 15 bitoj, de kiuj por la nura rekono tamen sufiĉas parto ne malpli granda ol la semantika informacio; lernenda estas de ankoraŭ ne komprenata radiko inter 22 kaj 26 bitoj (dufoje 11 bitoj kaj 11+15 bitoj). De la tiel rezultantaj 55 ĝis 65 mil bitoj da vortara informacio apartenas do ĉ. la duono, t.e. 30.000 bitoj, al la instruĵo por ĝermanlingvaj studentoj, ĉ. 30%, t.e. ĉ. 20.000 bitoj, al la instruaĵo por latinidlingvaj studentoj. Aldonendas la informacio de la gramatika instruaĵo. Sufiĉas la enhavo de la du presitaj paĝoj 1039-1040 (proksimume po 50 linioj je 80 skribmaŝinaj signoj) en Barandovská, 1993a. La lernenda semantika informacio estus proksimume 0,5 bitoj je signo, se nur temus pri germanlingva teksto (vd. ekz. Barandovská, 1993a, p.175); sed enestas iom malpli ol 10% en ILo kun mezume malpli ol 3 bitoj je signo da (ankaŭ sintaktika) informacio lernenda. Sume la gramatika instruaĵ-informacio do estas maksimume $8000 \cdot (0,9 \cdot 0,5 + 0,1 \cdot 3) = 6000$ bitoj. Sekve la subjektiva instruaĵ-informacio de prepara ILo-kurso por ĝermanlingvanoj estas ĉ. 36.000 bitoj, kaze de latinidlingvanoj ĉ. 26.000 bitoj.

Por la lernfacileco de la ILo-instruaĵo en la preparkursoj oni do kalkulas per (7) kaze de ĝermanlingvaj studentoj 0,021 po horo de tradicia kaj 0,056 po horo de programita aŭdvida instruado. Por la latinidlingvanoj la rezultoj estas 0,029 resp. 0,0775 po horo. La optimuma longeco T_{opt} de la preparkurso dependas krome de la tuta disponebla instrutempo D kaj de la komenca nekompetenteco pri la ILo-instruaĵo. Ni supozas ke de tio, kion ne ĉiuj ĝermanlingvanaj (resp. latinidlingvanaj) gestudentoj supozeble pro sia gepatra lingvo jam komprenas de ILo, do de la instruaĵo tipa por ILo-kursoj en tiu lingvoregiono, la unuopulo *ne* konas individuan parton $0,8 \le u(0) \le 1$. Se oni uzas nian simplan supozon $r(P) = P$, oni ricevas la tabelon 1. Ĝi enhavas ankaŭ la (sub la samaj kondiĉoj

kalkulitajn) legitimeblajn intervalojn]T[por la daŭro de la lingva preparkurso, por ke la fina rezulto estu pli bona ol tiu sen ajna helpo - aŭ eĉ ol tiu atingebla per tradukado. Sub la (sufiĉe realisma) supozo, ke la lernfacileco λ de la precipa kurso estas proksimume 0,02 je horo estas aldonita en la tabelo la faktoroj, per kiuj reduktiĝas $u(0)$ per optimuma daŭro de la lingva preparkurso - absolute, relative al la redukto okazanta laŭ (2) sen preparo kaj sen traduko, kaj relative al la redukto okazanta laŭ (3b) sen preparo sed per traduko. (]T[aŭ]$a;b$[signifas ambaŭflanke nefermitan intervalon.)

$1-P(0)$ $=U(0)$	lernfacileco de lingva preparkurso $\Lambda / \frac{1}{h}$	disponebla instrudaŭro D/h	optimuma daŭro de preparkurso T_{opt}/h	(4) / u (0) / %	(4) / (2) /% kompare kun tuja instruado	]T[kompare kun tuja instruado	(4) / (3b) /% kompare kun tradukado	]T[kompare kun tradukado
1	0,021	30	14	92	92	]0; 30[	(124)	-
	(ĝerman-	60	26	75	75	]0; 60[	(137)	-
	lingvanoj;	120	45	40	40	]0; 120[	(133)	-
	tradicie)	240	72	7	7	]0; 240[	80	]46; 103[
	0,029	30	13	90	90	]0; 30[	(121)	-
	(ĝermanl.;	60	25	70	70	]0; 60[	(127)	-
	aŭdvide,	120	41	33	33	]0; 120[	(111)	-
	programite)	240	62	5	5	]0; 240[	56	]29; 116[
	0,056	30	12	84	84	]0; 30[	(113)	-
	(latinid-	60	20	58	58	]0; 60[	(106)	-
	lingvanoj;	120	31	23	23	]0; 120[	77	]15; 57[
	tradicie)	240	44	3	3	]0; 240[	37	]13; 20[
	0,0775	30	11	80	80	]0; 30[	(109)	-
	(latinidl.;	60	18	53	53	]0; 60[	97	]13; 25[
	aŭdvide,	120	27	20	20	]0; 120[	65	]10; 59[
	programite)	240	36	2	2	]0; 240[	24	]9; 120[
0,8	0,021	30	8	87	98	]0; 16[	(124)	-
	(ĝerman-	60	19	68	87	]0; 42[	(141)	-
	lingvanoj;	120	38	35	56	]0; 92[	(148)	-
	tradicie)	240	63	6	16	]0; 190[	(110)	-
	0,029	30	9	85	95	]0; 19[	(122)	-
	(ĝermanl.;	60	19	64	82	]0; 44[	(132)	-
	aŭdvide,	120	35	30	48	]0; 94[	(126)	-
	programite)	240	57	5	12	]0; 190[	81	]32; 85[
	0,056	30	10	80	91	]0; 22[	(115)	-
	(latinid-	60	18	55	70	]0; 47[	(113)	-
	lingvanoj;	120	28	23	35	]0; 96[	72	]18; 42[
	tradicie)	240	41	3	7	]0; 192[	46	]14; 95[
	0,0775	30	9	78	88	]0; 23[	(111)	-
	(latinidl.;	60	16	51	65	]0; 48[	(104)	-
	aŭdvide;	120	24	19	30	]0; 96[	79	]11; 46[
	programite)	240	34	2	5	]0; 192[	37	]10; 96[

Tabelo 1. Influo de la instrulingvaj nekompetenteco $U(0)$ kaj lernfacileco Λ, kaj de la entute disponebla instrudaŭro D al la utilaj kaj optimuma daŭroj T de lingva preparkurso kaj al la relativa restanta fina nekompetenteco post la esenca kurso (havanta lernfacilecon λ = 0,02 1/h) - kompare kun tuja instruado kaj kompare kun la fraz-post-fraza tradukado.

2.6 *Lerneksperimentoj uzantaj diversbone regatajn instrulingvojn*

Por laŭeble egaligi ĉiujn variablojn krom la instrulingvo oni preparu aŭdvidan lecionon en la pensadlingvo de la lernantoj (ekzemple la germana) kaj traduku ĝin en aliajn lingvojn (ekzemple en ILon kaj la anglan); la sama instruisto prezentu laŭeble dum egalaj instrutempoj d la diversajn (surbendigendajn) formojn de la kurso.

Konstruinte en la pensadlingvo de la lernantoj ankaŭ testdemandojn pri la enhavo de la leciono oni mezuras la kvantojn F da eraroj en la testo. Ĝi estas F_0 antaŭ la prezentado kaj F_1 post la prezentado de la leciono en fremda lingvo L. F respegulas la nekompetentecon u, estante 0 por $u = 0$ kaj kreskante proporcie al ĝi. Laŭ egalaĵo (1) tial la kvociento $F_0 : F_1$ egalas al la kleriginkremento w :

(8) $$\frac{F_o}{F_1} = w = \frac{u(0)}{u(D)} = e^{\lambda D}$$

Tuj sekve oni prezentas la lecionon en la pensadlingvo de la lernantoj kaj mezuras la kvanton da eraroj F_2 en la denova apliko de la testo. Se la instruaĵo estas sufiĉe homogena kaj homogene prezentita (t.e.: se la lernfacileco kaj la ripetadofteco - do la lernprobablo - de ĉiuj lernelementoj proksimume egalas), tiam ne estus ŝanĝo de la lernfacileco λ de la ankoraŭ ne lernita instruaĵresto, sekve estus (pro la sama daŭro d de la leciono en ambaŭ lingvoj) la kleriginkremento $w = e^{\lambda d}$ neŝanĝita, do $F_0 / F_1 = F_1 / F_2$ (vd. Barandovská, 1993a, pj. 107-200, 357, 530 k.a.) - se la fremdlingvo estus same bone regata kiel la pensadlingvo. Se ne, tiam la lernfacileco λ_L, sekve la kleriginkremento w_L, estis malpli granda, kio laŭ (2) signifas, ke $r(P) < 1$ kaze de la fremda instrulingvo L. El (1), (2) kaj (8) sekvas eblo empirie mezuri $r(P)$ el la testrezultoj de la proponita eksperimento:

(9a) $$r(P) = \frac{\ln(F_0 / F_1)}{\ln(F_1 / F_2)} = \frac{\ln w_L}{\ln w}$$

se la tradukita leciono daŭras precize samlonge kiel sia originalo; w_L signifas evidente la kleriginkrementon mezuritan por la leciono tradukita en la fremdlingvon L. Ĝenerale, t.e. se la originalo havas la longecon d, la tradukita leciono la longecon d_L, oni samvoje ricevas

(9b) $$r(P) = \frac{\frac{1}{d_L}\ln\frac{F_0}{F_1}}{\frac{1}{d}\ln\frac{F_1}{F_2}} = \frac{\frac{1}{d_L}\ln w_L}{\frac{1}{d}\ln w} = \frac{\lambda_L}{\lambda}$$

Se oni sufiĉe fidinde povas mezuri la kompetentecon P pri la instrulingvo, kaj se ĝi sufiĉe disas kaj de 0 kaj de 1, tiam (9a,b) ebligas kontroli la supozon $r(P) = P$.

Se oni konas la tutan lerntempon $t = T(\mathrm{L})$ investitan por lerni la fremdan instrulingvon L de la komenca nekompetenteco $u(0) = 1$ ĝis $u(T[\mathrm{L}]) = 1 - P$, tiam oni povas kalkuli el (1) la facilecon $\lambda(\mathrm{L}) = \Lambda$ de ties lernado. Farante tion por diversaj fremdaj instrulingvoj L, ekz. por ILo kaj la angla, eblas kompari iliajn lernfacilecojn. (Ili dependas laŭ [7] ne nur de la diversampleksa instruaĵinformacio I sed ankaŭ de la eble diversaj efikancoj η de la kursoj pri tiuj lingvoj, kaj, se ili estis lernitaj en diversa aĝo, ankaŭ de la aĝdependa lernrapideco.)

La mezurado de la kompetenteco pri la instrulingvo fakte havigas problemojn (vd. ekz. Frank/Szerdahelyi, 1976; Frank, 1976b, 1977), kiuj ĉi tie ne estas pritrakteblaj. Sed

ne indas ilin pritrakti en nia konteksto, ĉar la supozo, ke $r(P)$ kreskas en la intervalo $0 \leq P \leq 1$ ne nur monotone de 0 al 1 sed eĉ lineare, t.e. la jam aludita supozo

$$(10) \qquad r(P) = P,$$

estas almenaŭ praktike akceptebla proksimumaĵo, aplikenda ĝis kiam oni ne empirie trovis pli precize la funkcion $r(P)$ kaj ĝian - pro la monotoneco ekzistantan - inversan funkcion $P = r^{-1}(...)$. Tio ebligas ĉiukaze konkludi el 9(a,b) al la nekompetenteco $U = 1 - P$ pri la instrulingvo L, do pro (1) al la facileco Λ de ĝia iama lernado. En la plej simpla kazo (10) rezultas

$$(11) \qquad \begin{aligned} \Lambda &= -\frac{\ln U(T)}{T} \\ &= -\frac{\ln(1 - P(T))}{T} \\ &= -\frac{1}{T}\ln\left(1 - \frac{\frac{1}{d_L}\ln w_L}{\frac{1}{d}\ln w}\right) \end{aligned}$$

Por prezenti ĉion ĉi konvinke ankaŭ al tiaj studentoj, kiuj estas grandparte forgesintaj sian lernejan matematikon, oni baziĝu dekomence sur empiriaj donitaĵoj kaj profitu de la fakto, ke la kleriginkremento ofte ne estas multe pli granda ol 1, tiel ke

$$(12) \qquad \ln w = \ln(1 + [w - 1]) \approx w - 1$$

(Se $w > 1$ validas tamen ln $w < w$-1.) Tiel evitinte trifoje la logaritman funkcion per la proksimumaĵo eblas anstataŭigi la egalaĵon (11) per la prosimumaĵo

$$(13) \qquad \Lambda \approx \frac{1}{T} \cdot \frac{\frac{1}{d_L}(w_L - 1)}{\frac{1}{d}(w - 1)}$$

Ni sekve aplikas tion al empiriaj rezultoj.

3. *Rezultoj el eksperimentoj uzantaj diversajn instrulingvojn (Barandovská)*

Studentoj de la Universitato Paderborn vidis videofilmon pri Comenius, pri liaj ideoj pri Internacia Kolegio kaj Internacia Lingvo kaj pri la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. La teksto estis originale verkita en ILo kaj tradukita en la germanan (t.e.la pensadlingvo de la esplorpersonoj) kaj anglan lingvojn. Ĝin voĉlegis en ĉiuj tri lingvoj la aŭtorino, kies gepatra lingvo estas alia (la ĉeĥa). La daŭroj de la filmo estas d_G= 24 min en la germanlingva formo, $d_A = d_{ILo}$ = 30 min en la angla kaj la ILa formoj.

26 gestudentoj el klerigkibernetikaj kursoj respondis al po 15 testdemandoj antaŭ kaj post la prezentado de la angla formo. Ili faris entute F_0 = 227 erarojn antaŭ la prezentado, F_1 = 81 erarojn poste. Kiom granda estis ilia lernsukceso? Ĝin oni povas mezuri per la kleriginkremento w (aŭ per la produto el lernfacileco kaj lerntempo). Laŭ (8) la klerig-inkremeto estis w_A = 227:81 = 2,80 (kaj $\lambda_A d_A = \ln w_A = 1{,}03$).

Kion oni povas prognozi pri la lernsukceso, se oni ripetas la prezentadon de la filmo, aŭ se oni prezentas ĝin sekve en sia germanlingva formo? Pro tio, ke la klerig-inkremen-

to onigas la antaŭan nekompetentecon kiom ajn ĝi grandis, oni povas prognozi denovan redukton de la erarkvanto en la sama testo al la w-ono. Antaŭ la dua filmprezentado estis faritaj $F_1 = 81$ eraroj; la prognozo do estus $F_2 = F_1 / w_A = 81{:}2{,}80 = 28{,}93$ eraroj (en la mezumo de multaj tiaj eksperimentoj), se la kleriginkremento ne ŝanĝiĝis pro alia daŭro aŭ alia lernfacileco. Fakte al la studentoj ne estis prezentita denove la angla formo sed la malpli longa sed pensadlingva germana traduko, post kiu ili kune faris 37 erarojn. Do la kleriginkremento nun fariĝis malpli granda: $w = F_1 / F_2 = 81/37 = 2{,}19$. Tia granda diferenco malprobable baziĝis sur nura hazardo. Fakte ja estis la lerntempo malpli granda; sekve la produto el lernfacileco kaj lerntempo, de kiu ja dependas la lernsukceso (vd. egalaĵon 8!), reduktiĝis pro tiu kialo per la faktoro $d / d_A = 24/30$. (24/30 de $1{,}03 = \lambda_A d_A$ estas proksimume 0,8, kaj ankaŭ laŭ egalaĵo 8 rezultas $\lambda d = \ln w \approx 0{,}8$) Aliflanke la lernfacileco (λ) pro filmo en la pensadlingvo estas en krome samaj cirkonstancoj certe pli granda ol en ne perfekte regata fremdlingvo (λd devus tial esti pli granda ol $\lambda_A d$). Sed oni devas supozi iomete ŝanĝitan cirkonstancon: eble ne ĉiuj instruaĵeroj estas samfacile lerneblaj, sekve de la pli facilaj lernelementoj pli granda parto ol de la malpli facilaj estis lernitaj jam dum la prezentado de la angla formo, tiel ke mezume la lernfacileco de la elementoj ankoraŭ lerneblaj dum la germana filmformo eble estis malpli granda. (Oni fakte kalkulas $\lambda = \ln w$: 24 min = 0,033 1/min, kio estas iomete malpli granda ol $\lambda_A = \ln w_A$: 30 min = 0,034 1/min.)

Ĉu eblas pruvi, ke iuj lernelementoj estis tre facile lerneblaj? Ĉiu testdemando kontrolas, ĉu certa instruaĵero estas konata. Se du elementoj estas samfacile lerneblaj dum prezentado de la filmo, la eraroj pri ili reduktiĝas al la sama procentaĵo, nome - se ĉiuj elementoj estas samfacilaj - al $F_1 / F_0 = 1w$. La tabelo 2 enhavas la erarojn, kiujn la gestudentoj faris pri la unuopaj 15 testdemandoj.

Demando/ lernelemento	Studentoj erarintaj antaŭ la filmo: F_0 =	Studentoj erarintaj post la filmo: F_1 =	$F_1/F_0 = 1/w$ =
1	8	2	0,25
2	18	8	0,44
3	25	0	0,00 !
4	25	1	0,04 !
5	23	5	0,26
6	16	15	0,94
7	10	6	0,60
8	23	0	0,00 !
9	10	7	0,70
10	11	6	0,67
11	12	7	0,58
12	10	5	0,50
13	5	2	0,40
14	9	5	0,55
15	22	12	0,55
Entute:	227	81	0,36

Tabelo 2: Nombro de studentoj (el entute 26) erarintaj pri 15 testdemandoj

Forstrekinte la evidente tre facilajn demandojn 3, 4 kaj 8 restas F_0=154, F_1=80 kaj F_2=36. La supra kalkulo do estas jene por la pli homogena (kaj malpli facila!) resto de la instruaĵo modifienda: w_A = 154/80 = 1,925 ($\lambda_A d_A = \ln w_A$ = 0,655; λ_A = 0,655:30 min = 0,022 1/min); la kalkulita lernsukceso do reduktiĝis.pro preteratento de la tre facilaj elementoj. La prognozo pri la testrezulto post duafoja prezentado de la angla formo de la filmo estus: F_1 / w_A = 80/1,925 = 41,6 eraroj en la mezumo de multaj tiaj eksperimentoj - do nun pli ol la nur 36, kiuj aperis post la germana formo. Por ĉi tiu la kleriginkremento restas proksimume neŝanĝita (ĉar la tre facilaj elementoj ja ĉiukaze ne plu estis lerneblaj, do la lernfacileco ne de ili pligrandigita): w = 80/36 = 2,222 (λd = ln w = 0,799; λ = 0,799:24 min = 0,033 1/min)

Por kompari la lernfacilecojn de ambaŭ filmoj (sen uzi - kiel enkrampe farite - la egalaĵon 8 per la logaritma funkcio, kiu por ne malmultaj studentoj estas malfacile komprenebla) oni povas fari la jenan, proksimume ĝustan kalkulon:

Evidente la kleriginkremento estas des pli granda, ju pli da lerntempo d estas je dispono kaj ju pli granda estas la lernfacileco λ (egalaĵo 8 enhavas ja nelinearan funkcion, sed por lineare pensantaj studentoj eblas uzi linearan proksimumaĵon,). Se la lerntempo estus tre malgranda aŭ eĉ nula oni preskaŭ nenion aŭ eĉ precize nenion povus lerni, la erarnombro restus do - preskaŭ - konstanta, do la kleriginkremento estus - apenaŭ pli granda ol - unu. Kun kreskanta lerntempo d la kleriginkremento w kreskas de sia komenca valoro $w(0) = 1$ des pli rapide, ju pli facile estas la instruaĵo. Por mezuri la kreskad-rapidecon de la diferenco $w(d) - w(0) = w - 1$, oni nur dividu ĉi tiun per la tempo bezonata kaj ricevas $(w-1)/d$ kiel mezuron de la lernfacileco λ (anstataŭ precize $\ln w / d$, kio estas laŭ egalaĵo 12 proksimume la samo, pli precize: iom malpli granda).

Tiel oni ricevas kiel lernfacilecon de la 30-minuta angla filmo $(w_A - 1)/d_A = (1{,}925 - 1) : 30\,\text{min} = 0{,}031\ 1/\text{min}$ (anstataŭ, kiel supre, pli precize λ_A = 0,022 1/min). Por la germana formo la rezulto estas: $(w-1)/d$ = 1,22:24min = 0,051 1/min (anstataŭ, kiel supre, pli precize λ = 0,033 1/min).

Kial kaj kiomgrade malsuperas la lernfacileco de la sama instruaĵo, se ĉi tiu estas fremdlingve prezentita, la lernfacilecon en la kazo de pensadlingva prezentado? En egalaĵo 7 lernrapideco C_v kaj instruaĵinformacio I ja estas sendependaj de la instrulingvo. La diferencon kaŭzas do la efikanco η. Ĝi esprimas la procentaĵon de C_v uzita por la instruaĵo - kaj kompreneble estas malpli granda, se la vortigo de ĉi tiu lingve ne estas komplete komprenata. La kvociento $\lambda_A / \lambda = \eta_A / \eta$ estas la procentaĵo $r(P)$ de la efikanco kiu restas, malgraŭ transiro al fremda instrulingvo regata laŭ kompetenteco P. El niaj datumoj kalkuliĝas $r(P)$ = 0,031:0,051 = 0,61 (pli precize: 0,022:0,033 = 0,67). Supozante $r(P) = P$ la studentoj posedas do 61%an (pli precize: 67%an) kompetentecon de la uzita angla instrulingvo. - Kontrolcele oni povas klasigi la studentojn en tri klasojn, laŭ tio, ĉu ili taksas siajn konojn pri la Angla bona, meza aŭ malbona. Tabelo 3 enhavas la testrezultojn kaj la el ili kalkulitajn lernfacilecojn.

P	F_0	F_1	F_2	w_A	w	λ_A 1/min ≈	(=)	λ 1/min ≈	(=)	$\frac{\lambda_A}{\lambda}=\frac{\eta_A}{\eta}=r(P)(=P?)$ ≈	(=)
bona	5	2	1	2,5	2	0,050	(0,031)	0,042	(0,029)	1,20	(1,06)
meza	142	72	34	2,0	2,1	0,032	(0,023)	0,047	(0,031)	0,70	(0,72)
malbona	7	6	1	1,2	6,0	0,006	(0,005)	0,208	(0,075)	0,03	(0,07)
entute	154	80	36	1,9	2,2	0,031	(0,022)	0,051	(0,033)	0,61	(0,66)

Tabelo 3: Angla prezentado de la leciono antaŭ pensadlingva

Evidente kreskas $r(P)$ kun la kompetenteco, kiu ĉi tie tamen estas mezurita nur subjektive kaj per ordiga skalo. (La statistika bazo ebligas montri nur tendencojn, ĉar nur uno studento sin opiniis bona konanto de la Angla, nur du malbonaj.)
Kiom granda estas la lernfacileco se la filmo estas prezentata en ILo? Anstataŭ en la angla lingvo 16 aliaj gestudentoj vidis la videofilmon en ILo antaŭ ĝia prezentado en la pensadlingvo. Ili estis antaŭe lernintaj ILon dum T_{ILo} = 12 horoj kaj farintaj teston pri ilia akirita ILo-kompetenteco. La rezultojn kunigas tabelo 4. Spite la ne sufiĉan statistikan bazon evidentas laŭtendence la kresko de $r(P)$ kun P. Pro tio, ke en la eksperimentoj resumitaj per la tabeloj 3 kaj 4 la germanlingva filmo estis la sama, la pli grandaj rezultoj w kaj λ devas esti kaŭzitaj laŭ (7) de la gestudentoj, de kiuj ja supozeblas la sama lernkapablo C_v sed eventuale pli granda intereso por la instruaĵo.

P	F_0	F_1	F_2	w_{ILo}	w	λ_{ILo} 1/min ≈	(=)	λ 1/min ≈	(=)	$\frac{\lambda_{ILo}}{\lambda}=\frac{\eta_{ILo}}{\eta}=r(P)$ ≈	(=)
bona	28	9	3	3,1	3,0	0,070	(0,038)	0,083	(0,046)	0,84	(0,83)
meza	49	15	5	3,1	3,0	0,076	(0,039)	0,083	(0,046)	0,91	(0,86)
malbona	28	11	2	2,5	5,5	0,051	(0,031)	0,187	(0,071)	0,27	(0,44)
entute	105	35	10	3,0	3,5	0,067	(0,037)	0,104	(0,052)	0,64	(0,70)

Tabelo 4: ILa prezentado de la leciono antaŭ pensadlingva prezentado

Kiom facile ILo estas lernebla kompare al la Angla? Al la respondo al tiu ĉi demando niaj rezultoj kontribuas, se ambaŭflanke temas pri la lingvoparto utila por kompreni la lecionon. Por atingi en ILo (de 0) la relativan nivelon $P = r(P) \approx \eta_{ILo} / \eta$ kompare al la pensadlingvo la gelernantoj bezonis T = 12 horojn. El tabelo 4 (same kiel el la proksimume valida formulo 13) sekvas por tiu rapideco (kiel mezuro de la facileco lerni tiucele ILon): 0,64:12 h = 0,053 1/h. (La teorie preciza rezulto kalkuliĝas el la egalaĵo 11: Λ = 0,10.) La analoga kalkulo el la tabelo 3 montras ke la relativa facileco de la kompreno de anglalingva leciono kompare al pensadlingve prezentita kreskis dum la 1000 ĝis 2000 lernejaj studhoroj de 0 ĝis $P = r(P) = \eta_A / \eta$ = 0,61, do kun rapideco de maksimume 0,0006 1/h. (La rezulto de la pli ĝusta kalkulo laŭ formulo 11 estas maksimume 0,001 1/h.) La statistika bazo kaj la homogeneco de la esplorpersonoj kaj situacioj ne sufiĉas

por pravigi almenaŭ proksimume la laŭkvantan konkludon, ke ILo estus pli ol 80oble tiom facile lernebla ol la angla lingvo, se oni nur celas akiri la saman kapablon kompreni tiulingvajn fakkursojn. Sed tiu kalkulrezulto almenaŭ ne devias de la aro da asertoj, laŭ kiuj ILo estas dek- ĝis centoble pli facile lernebla ol la Angla.

Literaturo

BARANDOVSKÁ, V., komp. (1993a, b): Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko. Vol. 6 kaj 7. Akademia Libroservo per Esprima Bratislava, Kava-Pech Praha, AIEP San Marino, Institut für Kybernetik Berlin - 1993.

FRANK, H. (1976a): Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion. En: Behrmann kaj Ŝtimec, eld., Bildung und Berechnung / Klerigo kaj Prikalkulado, Bamberg, 1976, p. 9-55. Represita en Barandovská, 1993b, p. 727-773.

FRANK, H. (1976b): Zur relativen Lernleichtigkeit einiger Sprachen. GrKG 17/4, 1976, 120-124. Represita en Barandovská, 1993a, p.145-149.

FRANK, H. (1977): Die Meßmöglichkeit der relativen Schwierigkeit von Fremdsprachen. En: Lobin/Bink (komp.), Kybernetik und Bildung / Klerigo kaj prikalkulado, vol. III, 1977, 14-25. Represita en Barandovská, 1993a, p. 150-161.

FRANK, H. (1991): Notiz zur Rentabilität sprachlicher Vorschaltkurse zu Fachkursen. GrKG/Humankybernetik 32/4, 1991, p. 177-181. Represita en Barandovská, 1993a, p. 512-516.

FRANK, H. (1993). Ĝeneraligo de la lingvopedagogia aplikado de la kibernetika transferteorio. 13e Congrès International de Cybernétique. Association Internationale de Cybernétique, Namur, 1993, p. 382-386. Antaŭpresita en Barandovská, 1993a, p. 1020-1025.

FRANK, H. / BARANDOVSKÁ, V. (1991): Lernplifaciligo pro antaŭmetitaj lingvokursoj. Internacia Pedagogia Revuo 1991, 4, p. 11-15. Represita en Barandovská, 1993a, p. 621-625.

FRANK, H. & SZERDAHELY I. (1976): Zur pädagogischen Bestimmung relativer Schwierigkeiten verschiedener Sprachen. GrKG 17/2, 1976, 39-44. Represita en Barandovská, 1993a, p.537-542.

Ricevita 1994-04-25

Adreso de la aŭtoroj: ADoc. Dr. Vera Barandovská & Prof.Dr. Helmar Frank, Kleinenberger Weg 16A, D-33100 Paderborn

Unterrichtssprache und Lernerfolg (Knapptext)

Dient das Lernen oder Weiterlernen einer Fremdsprache in einem Vorkurs ausschließlich dazu, den Lernerfolg bei einem in dieser Sprache abgehaltenen Hauptkurs zu ermöglichen oder zu erhöhen, dann muß in der um die Vorkurslänge T verringerten Zeit D-T des Hauptkurses eine höhere Kompetenz erreichbar sein als ohne den sprachlichen Vorkurs in der Zeit D. Die Maximierung der im Hauptkurs erreichbaren Kompetenz ist Optimierungskriterium der Dauer T eines durch diese Kompetenzerhöhung legitimierten Vorkurses. Bei anfänglich völlig fehlender Kenntnis der Unterrichtssprache ist jede Zeit $T < D$ legitimiert; das Optimum von T wächst verzögert mit der verfügbaren Gesamtlernzeit D; das optimale Verhältnis T/D und die am Schluß des Hauptkurses verbleibende relative Inkompetenz sinken mit wachsendem D. Ist die Anfangsunkenntnis $U(0)$ der Unterrichtssprache kleiner als 100%, dann sind bei sonst gleichen Bedingungen die optimale und die maximal legitimierbare Vorkurszeit kürzer und die relative Restinkompetenz am Schluß des Hauptkurses kleiner.

Gegenüber einer satzweisen Übersetzung des Kurses in die vertraute Sprache („Denksprache") der Studierenden als alternative Maßnahme zur Erhöhung der Schlußkompetenz ist (bei Außerachtlassung der Übersetzungskosten) das Vorurteil des vorherigen Lernens der Unterrichtssprache geringer und besteht nur bei genügend großer disponierbarer Gesamtlernzeit D und bei nicht zu großer Anfangsinkompetenz in der Unterrichtssprache - und auch dann lediglich in einem Intervall zwischen einer Mindest- und Höchstzeit T für das Unterrichtssprachlernen (Tabelle 1).

Um z.B. Studierende aus dem germanischen Sprachraum mit 20% streuenden individuellen ILo-Vorkenntnissen auf internationalsprachig erteilte Kurse im Umfang von 240 Stunden (ein Semester) vorzubereiten, ist ein audivisueller, programmierter ILo-Vorkurs im Umfang von 57 Stunden optimal und zwischen 32 und 85

Stunden auch statt einer satzweisen Übersetzung noch sinnvoll. Für Studierende aus dem romanischen Sprachraum berechnet man bei sonst gleichen Bedingungen ein von 10 bis 96 Sprachlernstunden reichendes Rentabilitätsintervall bei einer Optimalzeit von nur 34 Stunden. Die Werte sind bei schwieriger lernbaren Unterrichtsfremdsprachen ungünstiger. Aus den Daten einer empirischen Pilotstudie ergibt sich rechnerisch eine mindestens 80-fache Lernleichtigkeit von ILo gegenüber Englisch sogar für deutsche Lerner, wobei deutsche Studierende von der Schule eine durchschnittlich 66%ige Kompetenz der Unterrichtssprache Englisch mitbringen.

Instruction Language and Success of Learning (summary)

If a foreign language is learned or continued to be learned only in order to get a better learning success in a main course which will be realised in this language, than a higher competence must be attainable in the main course during the time D-T shortened by the length T of the preparing course. To maximize the competence attainable in the main course is the optimization criterium of the duration T of a preparing course legitmized by this higher final competence. If the initial knowledge of the instructional language is absolutely zero, than any time $T < D$ is legitimized; the optimal T increases with negative acceleration when more total learning time D is given; the optimal proportion T/D and the final relative noncompetence decrease when D increases. If the inital noncompetence $U(0)$ about the instruction language is less than 100%, than the optimal and the maximal legitimized duration of the preparing course are shorter and the final relative noncompetence at the end of the main course less hight - if all other circumstances are the same.

Compared with a sentence-after-sentence-translation of the course in the familiar language ("thinking language") of the students as an alternative method to get a higher final competence the advantage of a preliminary learning of the instruction language (if the cost of translation may not be considered) is smaller and exists only if the total time D at disposition is sufficent long and the initial noncompetence not to great - and even in this case only in an interval between a minimal and a maximal time T for the learning of the instruction language (table 1).

In order to prepare students from the teutonic language area, which have preknowledge of ILo with a variation about 20%, to courses during together 240 hours (one semester), the optimal length of an audiovisual, programed ILo-course is 57 hours, and it is more economic even as a consecuting translation when the course length is between 32 and 85 hours. For students from the romanic language area the calculs leads for otherwise the same conditions to an interval of rentability between 10 and 96 hours of language learning, with an optimum at only 34 hours. These results are less favorable for instruction languages which are more difficult to be learned. From the data of an empiric pilotstudy one may calculate that ILo is at least 80 times easier to be learned as English even by German learners, and that German students dispose from school in the mean about 66% of competence in the instruction language English.

grkg / Humankybernetik
Band 35 · Heft 2 (1994)
Akademia Libroservo / IfK

Rechnergraphische Optimierung und Bestimmung der Legitimierbarkeitsgrenzen des Zeitaufwands lernfördernder Vorkurse

von Tilo FRANK, Paderborn (D)

aus dem AIS-Institut für Kybernetik Paderborn & Prag (Direktoren: Prof.Dr.H.Frank, Prof.Dr.M.Lánský, Prof. Dr.M.Wettler)

1. *Problemstellung*

Schon oft wurde die Frage erörtert, ob und gegebenenfalls in welchem Umfang ein sprachlicher Vorschaltkurs den Lernerfolg von Studierenden, welche die Unterrichtssprache nicht voll beherrschen, auch dann vergrößert, wenn die für den Vorschaltkurs benötigte Zeit T von der insgesamt disponierbaren Zeit D abgezweigt wird, so daß die Dauer des Hauptkurses auf $D-T$ sinkt. (Vgl. z.B. Frank/Barandovská, 1991, 1994).

In Frank/Barandovská, 1991, S.12 wurde die Frage durch ein hypothetisches Beispiel graphisch, in Barandovská/Frank, 1994, wurde dies durch Formelausdrücke (5) und (6a,b) beantwortet. Genannt sind die Rentabilitätskriterien für den Vorschaltkurs, und zwar

- zum einen gegenüber einer vollen Nutzung der disponierbaren Zeit D für den Hauptkurs
- zum anderen gegenüber einer satzweisen Übersetzung, durch die die verfügbare Zeit halbiert wird.

Jedoch wird das legitimierbare Intervall (T) der Vorschaltkursdauer nur implizit definiert, da die Auflösung nach T mittels üblicher Funktionen nicht möglich ist. Daher ist auch keine Formel für die optimale Vorkurszeitdauer angegeben.




Bild 1: Kompetenzwachstum in einem 240-stündigen Kurs bei geringer Beherrschung der Unterrichtssprache (Lernkurve 1) im Vergleich zum Kompetenzwachstum bei Start erst nach einem vorgeschalteten Sprachförderkurs im Umfang von 41 h (Lernkurve 2) bzw. 192 h (Lernkurve 3). Weitere Voraussetzungen vgl. Text.

Bild 1 soll die entstehenden Probleme verdeutlichen. Die Lernkurve 1 beschreibt das Kompetenzwachstum über einen („eigentlichen") Lehrstoff während eines fremdsprachlich durchgeführten Kurses unter der Voraussetzung, daß diese „Unterrichtssprache" zwar teilweise verstanden wird, aber nicht für diesen Zweck gleich gut wie die Muttersprache der Studierenden. Die Lernleichtigkeit λ des Kurses wird durch die unzureichende Beherrschung der Unterrichtssprache auf $r\lambda$, $0<r<1$, reduziert. Dabei wird r in Barandovská/Frank 1994 der Kompetenz $P<1$ über die Unterrichtssprache gleichgesetzt. Im folgenden wird mit P bzw. U die Kompetenz bzw. Inkompetenz in der Unterrichtssprache, mit p bzw. u dasselbe bezüglich des eigentlichen Lehrstoffs bezeichnet. Durch einen sprachlichen Vorschaltkurs der Länge T und der Lernleichtigkeit Λ kann die Sprachkompetenz P (Prozentsatz des Verstehens) erhöht, also das bestehende unvollkommene Sprachverständnis $U = 1\text{-}P$ reduziert werden, so daß zum Zeitpunkt T gilt:

$$(1) \qquad P(T) = 1 - U(0)e^{-\Lambda T}$$

Die Kompetenz $p(0)$ und damit die Inkompetenz $u(0) = 1 - p(0)$ über den eigentlichen Lehrstoff bleiben einstweilen konstant, jedoch wird dieser anschließend mit einer auf $P(T)\lambda$ vergrößerten Leichtigkeit gelernt. Diese Vergrößerung wächst mit steigender Sprachperfektionierungszeit T, wie die (steiler ansteigenden) Lernkurven 2 (für $T = 41$ h) und 3 ($T = 192$ h) zeigen. Da aber gleichzeitig die verbleibende Restzeit $D\text{-}T$ zur Erlernung des eigentlichen Lehrstoffs sinkt, lohnt sich der Sprachkurs nur bis zu einer bestimmten Dauer ($T = 192$ h) - wird T größer, dann wird am Schluß (zum Zeitpunkt $t = D$) eine kleinere Kompetenz erreicht als bei Verzicht auf einen sprachlichen Vorschaltkurs. Mit anderen Worten: die Lernkurve 1 würde erst nach Ablauf der verfügbaren Zeit D erreicht. Bei einer für Bild 1 angenommenen Gesamtlernzeit $D = 240$ h, einer anfänglichen Unvollkommenheit $U(0) = 0{,}8$ des Verständnisses der Unterrichtssprache, einer anfänglich völligen Unkenntnis ($u(0) = 1$) des eigentlichen Lehrstoffs und den Lernleichtigkeiten $\Lambda = 0{,}056$ 1/h im Vorkurs, $\lambda = 0{,}02$ 1/h im Hauptkurs wird der Vorkurs nur dann durch die Verbesserung des Hauptkursergebnisses legitimiert, wenn die Dauer des Vorkurses zwischen den daraus ermittelten Grenzen liegt ($0 < T < 192$ h).

Dieses offene Rentabilitätsintervall (T) wird kleiner, wenn als Alternative zum Vorkurs die satzweise Übersetzung infrage kommt. Durch diese wird ja das Verständnis vergrößert, die Lernkurve 1 in Bild 1 also durch eine rascher steigende Kurve ersetzt (Barandovská/Frank, 1994, Gleichung 3b), die von der Kurve 3 nicht mehr vor Ablauf der Gesamtzeit D (240 Stunden) erreicht wird. Wenn es dann überhaupt noch ein Rentabilitätsintervall gibt (wenn im Bild wenigstens die Kurve 2 noch rechtzeitig die Kurve 1 schneidet), interessiert die in diesem Intervall liegende Vorkursdauer T_{opt}, die in der Gesamtzeit D zur größtmöglichen Schlußkompetenz über den eigentlichen Lehrstoff führt. Dieses Maximum wird in Bild 1 durch die Lernkurve 2 nach der Vorkursdauer $T_{opt} = 41$ h erreicht. Alle Zahlenwerte gelten natürlich nur für die als Beispiel gewählten Parameterwerte (vgl. Tabelle 1 in Barandovská/Frank, 1994).

Mit Hilfe des Rechners können die Rentabilitätsgrenzen und der Zeitpunkt T_{opt} ohne Grenz- und Extremwertbestimmungen ermittelt werden, indem die Lernkurve

(2) $$p(t) = 1 - u(0)\mathrm{e}^{-P(T)\lambda(t-T)}$$

für $T < t < D$ wiederholt gezeichnet wird, und zwar bei langsam größer werdender Eingabe T bzw $x = T/D$ aber unveränderten Parameterwerten $u(0)$, $U(0)$, λ, Λ und D. Im folgenden Beitrag wird der Zusammenhang der Ergebnisse mit den Parameterwerten rechnergraphisch verdeutlicht.

2. *Vorgehensweise*

Die optimale und die sinnvolle (rentable) Vorkursdauer $T = xD$ hängen vom Exponenten der in (2) wiedergegebenen Lernfunktion ab, also (da λ und D konstant sind) wegen (1) vom Verhalten der Funktion

(3) $$\mathrm{f}(x) = (1 - U(0)\mathrm{e}^{-kx})(1 - x)$$

Dabei sind $0 \leq U(0) \leq 1$ und $k \geq 1$ vorgegebene Parameter. Die unterrichtssprachliche Inkompetenz oder Unkenntnis $U(0) = 1 - P(0)$ ist die anfängliche, unvollkommene (prozentuale) Verstehensfähigkeit der im Vorkurs zu perfektionierenden Unterrichtssprache. Der Wert $k = \Lambda D$ ist das Produkt aus verfügbarer Gesamtzeit D und „Lernleichtigkeit" Λ der Unterrichtssprache. Die Lernleichtigkeit wird allgemein (wie aus Gleichung 1 durch Differenzieren hervorgeht) gemessen als Unkenntnisabnahme (Kompetenzzuwachs) in der Zeiteinheit relativ zur noch bestehenden Unkenntnis - also als relative Änderungsgeschwindigkeit. Sie hängt von diversen, empirisch zu bestimmenden bildungskybernetischen Parametern ab und wird (vgl. Barandovská/Frank, 1994, Gleichung 7) berechnet als Produkt aus der durchschnittlichen Lerngeschwindigkeit der Kursteilnehmer und der Effikanz (Qualität) des Kurses dividiert durch die in ihm anzubietende Lehrstoffinformation. Letztere hängt im Spezialfall des Sprachvorkurses ihrerseits u.a. auch von den im Sprachbereich der Lerner voraussetzbaren Vorkenntnissen ab.

Die unabhängige Variable x gibt den für den Vorkurs verwendeten Zeitanteil an: $x = T/D$. Da durch

(4) $$\frac{1 - p(D)}{1 - p(0)} = \frac{u(D)}{u(0)} = \mathrm{e}^{-\lambda D \mathrm{f}(x)} = \left(\frac{1}{\mathrm{e}^{\lambda D}}\right)^{\mathrm{f}(x)}$$

ausgedrückt wird, welcher Bruchteil der anfänglichen Inkompetenz am Schluß des Hauptkurses verbleibt, kennzeichnet offensichtlich das Maximum von $\mathrm{f}(x)$ die optimale Vorkursdauer. Sie liegt im Rentabilitätsintervall (T), falls dieses nicht leer ist. Dies ist, wie bei Barandovská/Frank, 1994, dargelegt, solange nicht der Fall, solange im Intervall $(0; 1)$ Werte x existieren, für die

(4a) $\mathrm{f}(x) > 1 - U(0) = s$ bzw. (4b) $\mathrm{f}(x) > \dfrac{1 - U(0)}{2} = s_{ü}$

gilt. Dabei gilt die mildere Schwellenbedingung (4a) gegenüber der Alternative, den sofort (d.h. ohne Vorkurs) begonnenen Hauptkurs *nicht* zu übersetzen, die schärfere Bedingung (4b), falls er (als Alternative zum Vorkurs) übersetzt werden kann.

7.9 Kun ĝojo la senato eksciis de senatano Tyblewski, ke estas planita laŭjure fondi la Pollandan AIS-Asocion dum la 7-a Pola Studadsesio (Bydgoszcz). Ĝi estos jure kaj fakte kunportonto de la daŭre ŝvebanta pola filio. Kun ĝojo oni krome eksciis, ke kontribuos kurson en ILo al la studadsesio la pola profesoro kaj habilita doktoro Adam Sudol, kiu plenumas ĉiujn kondiĉojn por fariĝi efektiva membro de AIS. Tiujn kondiĉojn ankaŭ plenumas la pola profesoro kaj habilita doktoro Tadeusz Miczka, kiu jam ekde 1992 estas libera ISKano kaj helpis en la klopodoj pri kunlaboro kun la universitato Katowice, kie li regule instruas. Tiel eblos starigi direktoran triopon por la pola filio, konsistanta el la kolegoj Miczka, Sudol kaj Tyblewski. La prezidanto skribu al kolego Miczka informante lin pri la intenco de la senato, alvoki lin kiel efektivan membron, kaj petante lin transpreni la taskon, kunlabori en la pluevoluigo de la kontrakto pri pola filio. Senatano Tyblewski donos la analogan informon al kolego Sudol dum la 7-a Pola Studadsesio.

8. *(Akademiaj rekomendoj)*
La senato eksciis kaj aprobis, ke PDoc.Dr.Bormann uzos la ankoraŭ ĉe Akademia Libroservo kiel kajero de nova volumo de Acta Sanmarinensia aperonta publikaĵo kun la rezultoj de la akademia forumo de SUS 12 por realigo de kurso dum SUS 13. La prezidanto informis, ke la preskostojn kolego Bormann kaj li mem kune pagos, kaj ke li kulpas pri la prokrasto de la prespretigo, ne estante finredaktinta sian propran parton de la publikaĵo. Li promesis fari tion bontempe por ke la kajero estu je dispono antaŭ la komenco de SUS 13.

9. *(Diversaĵoj)*
9.1 Pro manko de tempo eblis kontroli la plenumitecon nur de parto de la senatdecidoj faritaj ekde la 12-a kunsido. La senata sekretario kaj la prezidanto estis surlistigitaj la decidojn, pri kies plenumiteco ili dubis. Plua pritrakto okazu dum la 24a senatkunsido.

9.2 Plenuminte sian tagordon la senato kunsidis en la Dikastero pri Publika Instruado kaj Kulturo, kie AIS daŭre havas sian sidejon, kun la Honora Direktorino de la Subtena Sektoro kaj gvidantino de ties sanmarina alo (konsiderata ekde 1993-09-05 kiel la Sanmarina Asocio de AIS), ASci. Mag.sc.hum.h.c. Marina Michelotti diskutante la lokan situacion kaj la perspektivojn de AIS. Kun Honora Senatanino Fausta Morganti, kiu ne povis ĉeesti, la prezidanto estis jam antaŭe aparte interkonsiliĝinta.

9.3 La 24-a senatkunsido okazu en la senata sidejo en San Marino (Via Piagge Superiori 48, telefono kaj fakso 00378-990601) kun la kutima tagordo 1994-08-27/29.

1994-05-12/1693pfR

Protokolis: ADoc.Dr.P.Chrdle, Senata Sekretario
kaj OProf.Dr.habil.H.Frank, prezidanto.

Skizo de kadra studadplano ĝis bakalaŭriĝo ĉe AIS (en fako studebla/ekzamenebla ĉe AIS)

propono al la Senatkunsido 1994-03-28

1. Eblas bakalaŭriĝi nur post pruvo de la studadmatureco – aŭ per maturecekzameno agnoskebla laŭ art. 7.8 de la Regularo pri instruado kaj studado ĉe AIS, aŭ per la samnivela studadakceptiga ekzameno ĉe AIS.

La bakalaŭriĝo eblas nur per adapta adopto de almenaŭ samnivela nacia studadfino aŭ en fako difinita ĉe AIS. La difino okazas per tio, ke efektiva membro de AIS prezentas konkretigon de ĉi tiu kadra studadplano al speciala studadplano. La konkretigo devas montri koheran instruaĵon, kiun li kune kun almenaŭ unu alia alvokita ISKano de la sama sekcio aŭ kune kun

efektiva membro el alia sekcio indikas per proponitaj nomo kaj enhavlisto al la koncernata fakarestro aŭ dekano aŭ vicdekano. Se laŭ ISD kompetentas por la sama fako ankaŭ aliaj efektivaj membroj, la difino okazu en interkonsento kun ili – laŭbezone per protokolenda decido de la fakar- aŭ sekcikunsido.

2. Bakalaŭriĝo okazas surbaze de minimume 80 studunuoj, inter kiuj minimume (A+B+C =) 40 el la speciala studadplano de la fako mem, al kiu ankaŭ apartenas la temo de la nemalhavebla bakalaŭriĝverkaĵo. La resto de la minimume 80 studunuoj povas esti akiritaj en ajnaj fakoj principe apartenantaj al sekcio de AIS, sendepende de tio, ĉu ankaŭ tiuj fakoj jam estas difinitaj en la senco de Art. 1.

3. La speciala studadplano por ĉiu fako enhavas devigan, por la fako esencan instruaĵon en la amplekso de almenaŭ (A = A0 + A1 + A2 ≥) 24 studunuojn. Tiu deviga instruaĵo konsistu el

- eventuale nemalhaveblaj metodoj kaj rezultoj el la eventuale ekzistantaj koncernaj bazaj kaj help-disciplinoj (la eble postulendaj kurskampoj – amplekso A0 ≥ 0 studunuoj – estu surlistigitaj):
- universitatnivele instruendaj , fundamentaj metodoj kaj ekkonoj de la fako inkluzive de ĝia elprovita (t.e. jam plurajn jardekojn konata) kohera teoria kerno (la surlistigendaj koheraj kurskampoj enhavantaj ĉi tiun fakan kernon ampleksu A1 ≥ 8 studunuojn),
- eventuale el la enhavo de kursoj (amplekso A2 ≥ 0 studunuoj) pri pli novaj aŭ plej aplikindaj ekkonoj de la fako.

La amplekso A1 + A2 de la striktasence faka studado ne malsuperu 14 studunuojn.

4. Al la speciala studadplano de la fako apartenu kursoj koncernantaj fakan komunikadon; ilia amplekso estu almenaŭ (B = B1 + B2 ≥) 6 studunuoj. Tiu deviga instruaĵo konsistu el:

- la enhavo de fakutilaj interlingvistikaj kursoj (ekzemploj: baza ILo-kurso haviganta la legkapablon de internacilingvaj faktekstoj kaj perekzemple enkondukanta en la interlingvistikon, plurlingva kurso pri la baza fakterminologio), kies amplekso estu B1 ≥ 2 studunuoj,
- la enhavo de fakutilaj kursoj pri aplikado de komputilo (ekz. por utiligi fakkoncernajn datenbankojn aŭ produkti presoriginalojn de fakaj tekstoj aŭ ebligi perkomputilan fakinstruadon aŭ modeligi fakajn enhavojn); la amplekso estu B2 ≥ 2 studunuoj.

5. Kompletige apartenu al la speciala studadplano de la fako metateorie pliprofundigaj kaj praktike aplikadkapabligaj kursoj; ilia amplekso estu almenaŭ (C = C1 + C2 ≥) 6 studunuoj. Tiu deviga kompletigo konsistu el:

- filozofiaj aŭ fakkoncernaj aliaj metateorioj (ekz. fakhistoriaj, faksemiotikaj, fakdidaktikaj) kursoj, kies amplekso estu C1 ≥ 2;
- kursoj celantaj havigi bazajn kapablojn ens pezige apliki la fakkonojn; amplekso C2 ≥ 2.

6. La studadplano indiku, kiel la postulitaj studadunuoj estas akireblaj (kie okazadas koncernaj kursoj aŭ kiaj eroj el la instruteko de AIS estas je dispono aŭ kiu literaturo estas studinda, aŭ kiu respondas al koncernaj demandoj).

Por enobjektigitaj (libroformaj, aŭdvidaj, perkomputilaj) kursoj ekzistu bontempe normigita ekzamenmaterialo ebliganta distancan ekzamenadon kontroleblan fare de eĉ alifaka AISano.

7. La skriba ekzameno laŭ artikolo 15 de la ekzamenregularo de AIS – antaŭiranta la studadfinan buŝan ekzamenon – koncernu la kernan instruaĵon (t.e. enhavojn el A1 studadunuoj). El inter la atestoj pri la B studunuoj pri faka komunikadkapablo kaj la C studunuoj pri metateoria pliprofundigo kaj praktika aplikado almenaŭ po unu havu sufiĉan noton; studunuoj pro distanca studado estas nur validaj, se ili estas atestitaj almenaŭ kun noto 7/10.

Kleriginstitucioj de AIS

La Senato de AIS decidis 1993-09-03/1693 pfR adaptigi la regularon al novaj bezonoj tiel, ke eblos

a) studi kaj ekzameniĝi (kun escepto de la publika fina ekzameno) malĉeeste pere de la instruteko, kiu respektu la principojn diskutitajn dum la Akademia Forumo en Bialystok

b) studi en apartaj kleriginstitucioj de AIS - ĉu en blokoj dumferiaj aŭ semajnfinaj aŭ per vesperaj kursoj por laborantoj, ĉu paralele al daŭra studado en samloka universitatnivela klerigejo.

Por kleriginstitucioj de AIS validu la jenaj principoj.

OProf. Dr.habil. Helmar G. FRANK
Prezidanto

1993-09-16/1693pfR

1. „*Kleriginstitucio de AIS* “ estas klerigejo, kiu estas aŭ institucio de AIS mem aŭ de asocio lande aŭ regione subtenanta la Akademion, aŭ komuna institucio de AIS kaj de tia asocio (ekz. de AIS-filio), aŭ ĝi apartenu al ŝtata aŭ privata institucio, kiu pri la funkcio de la kleriginstitucio eniris kontrakton kun AIS senpere aŭ de AIS aprobitan kontrakton kun landa aŭ regiona asocio subtenanta la Akademion. Kleriginstitucio de AIS laboru en urbo kun universitato aŭ alia altlernejo aŭ en kunlaboro kun tia universitatnivela klerigejo. „Kleriginstitucio *de AIS*“ do ne nepre signifas juran sed jes ja nivelan respondecon de AIS.

2. Al la daŭra, regula instruistaro de kleriginstitucio de AIS apartenu almenaŭ tri AISanoj (MdAIS, AMdAIS aŭ AdAIS), inter kiuj almenaŭ unu apartenu al la gvidantaro de la klerigejo.

3. Almenaŭ 30% de la kursoj, pri kiuj la partoprenantoj povas ricevi atestojn, kiuj validigas la partoprenintecon kiel studunuon en la senco de la regularoj pri instruado, studado kaj ekzamenoj, okazu en ILo. Krom tiuj „internaciaj studadkursoj“ (kiuj estas la kernaj, specialaj aŭ kromaj kursoj de la „internacia studadprogramo“ de la klerigejo) la klerigejo povas oferti ekster la scienca kunrespondeco de AIS aliajn kursojn, seminariojn kaj unuopajn lekciojn, pri kiuj la partoprenantoj ne ricevu atestojn pri akiritaj studunuoj de AIS, kaj kiuj ne aperu en la programo de la klerigejo en la sama rubriko kiel la internaciaj studadkursoj kondukantaj al sciencista grado de AIS. (La klerigejo tamen povas atesti la partoprenon kaj uzi tiucele aldone al sia nomo la indikon „kleriginstitucio de AIS“, sed indikante, ke la kurso ne apar-tenas al sia internacia studadprogramo.)

4. Rajtas realigi atesteblajn kursojn en la senco de alineo 3

- ĉiuj fake kompetentaj enlandaj alvokitaj ISK-anoj (AdAIS, AMdAIS, MdAIS)
- ĉiuj liberaj fake kompetentaj enlandaj ISKanoj, kiuj enlande instruadas aŭ instruadis universitatnivele
- ĉiuj docentoj de AIS (ADoc, PDoc, AProf, OProf).

5. Ekzistu gvidorgano konsista el 3–5 direktoroj, de kiuj minimume du enlandaj kaj minimume du kun bona esprimkapablo en ILo, minimume du kun rango almenaŭ de ADoc. de AIS, minimume du estantu aŭ estintu profesoroj aŭ docentoj de nacia (ŝtata aŭ ŝtate agnoskata privata) – enlanda aŭ eksterlanda – universitato.

6. Enskribo (krom kun la celo akiri la maturecekzamenon de AIS aŭ sekvi kursojn ne atesteblajn por AIS en la senco de alineo 3) nur eblas ekde maturecekzameno nacinivela aŭ de AIS. Kiu ne havas maturecekzamenon sed ja post la fino de la deviga lernejo

- kompletigon de profesia lernado,
- minimume 10 jarojn da profesiaj spertoj,
- bonajn ILo-konojn kaj
- aĝon de minimume 25 jaroj

povas ricevi de la gvidorgano de la klerigejo ateston pri enskribo al studado rezignante pri maturecekzameno, se sukcesa studado de la elektita fako estas probabla.

7. En ĉiu semestro ekzistu la eblo, akiri almenaŭ pasivajn ILo-konojn kaj fari la bezonatan ekzamenon pri lingvokompreno en la kleriginstituto mem.

8. Estu ĉiujare minimume 10 studentoj, kiuj enskribiĝas kiel studentoj de la kleriginstituto kaj de AIS senpere – pagante al AIS 0,3 AKU por ricevi studadlibron aŭ studentan legitimilon kun studenta numero de AIS kaj ateston pri (ĝis pruvo de sufiĉaj ILo-konoj almenaŭ provizora) enskribo kun difinita studadcelo (aspirata sciencista grado). Povas sekvi la internaciajn kursojn (vd. alineon 3) kaj ricevi pri tio atestojn por eventuala posta uzado por studadfino ĉe AIS ankaŭ studentoj, kiuj ja plenumas la kondiĉojn de alineo 6 sed ne havas jam studenten numeron de AIS.

9. Kadre de la internacia studadprogramo de la klerigejo ekzistu minimume du studadplanoj por fakoj el diversaj sekcioj de AIS, garantiante la interfakecon de studado. La klerigejo povas krome oferti ekster la internacia studadprogramo por aliaj fakoj pluajn studadplanojn, kiuj ne kondukas al finekzameno ĉe AIS sed ja al finaj ekzamenoj de la klerigejo mem.

10. Por ĉiu fako, kion eblas studi en la klerigejo laŭ studadplano de la internacia aŭ de alia studadprogramo, la klerigejo okazigu minimume du kursojn en ILo.

11. La fakaj ekzamenoj (normale skribaj) povas okazi en la klerigejo mem; ĝi donu la ateston pri la ekzamenorezulto. La kotizoj por la kursoj kaj ekzamenoj estu pagendaj al la klerigejo, kiu fiksas la kotizojn, rekompencas la instruantojn kaj ekzamenantojn kaj pagas al AIS

a) 1/4 de la enspezoj el tiuj kursoj de la internacia aŭ alia studadprogramo, kiuj okazis en ILo,
b) 1/3 de la kotizoj ricevitaj de studentoj de AIS por ursoj de la internacia studadprogramo ne okazintaj en ILo,
c) 1/2 de la ekzamenkotizoj ricevitaj de studentoj de AIS pri kursoj el la instruteko de AIS.

La aliaj ekzamenkotizoj, krom por la publika finekzameno por akiri la celitan gradon de AIS fare de studentoj de AIS, restu komplete ĉe la klerigejo.

12. La kleriginstitucio konduku per sia internacia studadprogramo unuavice al la nivelo de bakalaŭreco, celu la oficialan landan agnoskon de ĉi tiu sciencista grado kaj havu prospektivplanon plievoluigan ĝis la magistreca nivelo.

13. La publika finekzameno por akiri la celitan sciencistan gradon de AIS (Bac.sc. ...) okazu dum SUS aŭ – kun aprobo de la ekzamenofico de AIS dum alia studadsesio de AIS (se oportune realigenda helpe de la klerigejo), se ĉi tiun partoprenas – kaj apartenas al la ekzamenkomitato – minimume unu senatano aŭ vicsenatano aŭ honora senatano de AIS kaj minimume unu dekano aŭ vicdekano aŭ konstanta membro de la ekzamenofico de AIS. La ekzamenkotizo estu tio fiksita en la regularo de AIS, se ne por la koncerna SUS aŭ studadsesio aliaj kotizoj estas interkonsentitaj. La duono de la netaj enspezoj el la ekzamenoj ricevu AIS. Se kandidato prezentas kiel kondiĉo por esti akceptita por la publika fina ekzameno studadunuojn akiritajn jam antaŭ sia enskribiĝo kiel studento de AIS, la klerigejo rekompencas al AIS po 0,01 AKU por ĉiu tia agnoskita studunuo.

14. La kleriginstitucio raportu dufoje jare
a) pri la tuta nombro de la enskribiĝintoj en kursoj,
b) pri la nomaro (kun necesaj aldonoj biografaj) de novaj AIS-studentoj,
c) pri la kursoj kaj la nombro de partoprenantoj en kursoj faritaj en ILo,
d) pri la kursoj, pri kiuj la studentoj de AIS ricevis studunuojn,
e) pri la uzado de la instruteko kaj
f) pri oportuna tempointervalo kaj antaŭvidebla amplekso de la kandidataro de eventuale bezonota finekzameno.

15. La klerigejo zorgu, ke siaj instruantoj kontribuu al la komuna instruteko de AIS kaj de la kleriginstitucioj de AIS kaj partoprenu en la disvastiĝreto de la instruteko.

16. Ĉi tiuj reguloj estas ankaŭ aplikeblaj, se temas pri kleriginstitucio, en lando, kie la Akademion reprezentas filio (t.e. komuna entrepreno de AIS kun landa aŭ regiona asocio subtenanta la Akademion). En tiu kazo la supre difinitaj enspezoj de AIS estas enspezoj de ĝia filio, kiu po duone havigos ilin al AIS kaj la asocio kunportanta la filion.

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,
(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,
(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj
(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato okazinta en San Marino

la sciencistajn gradojn

„Baccalaureatus scientiarum humanarum (Bac.sc.hum.)“
— t.e. bakalaŭro pri humanistiko — al

Kelly HERNDON el Marburg (D) *1963-10-30 en Pittsburgh (USA), en la fako „kompara lingvistiko“ (dokumento 1692 B 001)

„Magister scientiarum cyberneticarum (Mag.sc.cyb.)“
— t.e. magistro pri kibernetiko — al

Bernhard WAGNER el Karlsruhe (D) *1948-02-27 en Karlsruhe (D), en la fako „komunikadteknologio“ (dokumento 1692 M 002)

„Magister scientiarum morphologicarum (Mag.sc.morph.)“
— t.e. magistro pri morfosciencoj — al

Edmilson LIMA SEREJO el Freiburg (D) *1955-01-02 en Fortaleza-Ceará (BR), en la fako „forstscienco“ (dokumento 1692 M 001)

„Doctor scientiarum philosophicarum (Dr.sc.phil.)“
— t.e. doktoro pri filozofio — al

Helmut ANGSTL el München (D) *1923-07-12 en Neukirchen (D), en la fako „logiko kaj epistemologio“ (dokumento 1692 D 001)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1992-09-05/1692pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la Respubliko de San Marino la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo enskribigis la supre surlistigitajn agnoskojn en la „REGISTRON de eksterlandanoj portantaj akademiajn titolojn kies grado estas latinforme agnoskata en San Marino post kiam ili sukcese plenumis suplementajn studojn kaj sukcese trapasis ekzamenon de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino“ (kun n-roj 89-92). La publika transdono de la koncernaj atestoj kaj dokumentoj parte jam okazis en San Marino 1992-09-05 dum la ferma solenaĵo de SUS 11 kaj parte okazos poste.

Respubliko de San Marino, 1992.09.05/1692pfR
La Direktoro de la Ekzamenofico kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

a g n o s k i s   s u r b a z e   d e

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,
(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,
(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj
(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la 12a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 12) okazinta en San Marino

l a   s c i e n c i s t a j n   g r a d o j n

„Baccalaureatus scientiarum cyberneticarum (Bac.sc.cyb.)"
— t.e. bakalaŭro pri kibernetiko — al

Zlatko TIŠLJAR el Maribor (SLO) *1945-05-19 en Zagreb (KRO), en la fako „statistika lingvo-pedagogio" (dokumento 1693 B 001)

„Magister scientiarum humanarum (Mag.sc.hum.)"
— t.e. magistro pri humanistiko — al

Peter ALTMIKS el Paderborn (D) *1965-11-22 en Höxter (D), en la fako „ekonomiko" (dokumento 1693 M 002)

„Magister scientiarum structuralium (Mag.sc.struct.)"
— t.e. magistro pri strukturscienco j— al

Sara REISENAUER el Sibiu (RO) *1957-09-15 en Sibiu (RO) , en la fako „matematiko" (dokumento 1693 M 003)

„Magister scientiarum morphologicarum (Mag.sc.morph.)"
— t.e. magistro pri morfosciencoj — al

Vinko OŠLAK el Klagenfurt/Celovec (A) *1947-06-23 en Slovenj Gradec (SLO/YU), en la fako „kultura mediplanado" (dokumento 1693 M 003)

„Doctor scientiarum naturalium (Dr.sc.nat.)"
— t.e. doktoro pri natursciencoj — al

Jerzy LECHOWSKI el Warszawa (PL) *1932-07-10 en Okalina (PL), en la fako „fiziko" (dokumento 1693 D 001)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1993-09-05/1693pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la Respubliko de San Marino la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo enskribigis la supre surlistigitajn agnoskojn en la „REGISTRON de eksterlandanoj portantaj akademiajn titolojn kies grado estas latinforme agnoskata en San Marino post kiam ili sukcese plenumis suplementajn studojn kaj sukcese trapasis ekzamenon de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino" (kun n-roj 93-97). La publika transdono de la koncernaj atestoj kaj dokumentoj okazos en San Marino dum la malferma solenaĵo de SUS 13.

Respubliko de San Marino, 1993.09.05/1693pfR
La Direktoro de la Ekzamenofico kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

Mitteilungen des Instituts für Kybernetik Berlin e.V.
Direktorium:

Prof.Dr. Horst Völz, Koppenstr. 59, D-10243 Berlin, Tel.: 030-2750827, Federführender Direktor
Prof.Dr. Uwe Lehnert, Königin-Luise-Str. 73A, D-14195 Berlin, Stellvertretender Direktor
Dr. Siegfried Piotrowski, Schultenhardstr. 27, D-58093 Hagen, Stellvertretender Direktor
ADoc.Dr. Vera Barandovská-Frank, Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn, Schriftführerin
Bankverbindung: Konto Nr. 6123037500 bei der Berliner Bank, BLZ 100 200 00 und über
AIS Deutschland e.V., Postbank Hannover 2051-305, BLZ 250 100 30

Protokoll der Mitgliederversammlung des Instituts für Kybernetik Berlin. e.V.
am Freitag, 25. März 1994 in Stuttgart, an der Universität Stuttgart, im Gebäude der Fakultät Informatik, Stuttgart-Möhringen, Breitwiesenstr. 20-22., Hörsaal 22.03
Begin: 18.00 Uhr, **Ende:** 19.45 Uhr, **Teilnehmer:** gemäß Anwesenheitsliste, entschuldigt: Prof. Alisch, L.Hoffmann, Prof. Reitberger, Prof. Strombach, Prof. Pietsch, P. Pastors, AProf. Schulz, G. Marhold, G. Müller, Prof. Völz.
Vorgelegte Stimmrechtsübertragungen auf Prof.Dr. Frank: Prof. Alisch, L.Hoffmann, Prof. Reitberger, Prof. Strombach, auf Dr. Vera Barandovská-Frank: AProf. R. Schulz, Dr. Polak.

T.O.P.1: Es wird festgestellt, daß die Sitzung frist- und ordnungsgemäß einberufen und die Beschlußfähigkeit gegeben ist. Die anwesenden Mitglieder sind stimmberechtigt. Zum Versammlungsleiter und gleichzeitig Protokollführer wird einstimmig S. Piotrowski gewählt.

T.O.P.2: Das Protokoll der letzten Mitgliederversammlung vom 1993-12-05, veröffentlicht mit Anlage zu Heft 4/1993 grkg/Humankybernetik, wird einstimmig genehmigt.

T.O.P.3: Der Bericht über das abgelaufene Geschäftsjahr 1993 wurde anläßlich der Mitgliederversammlung am 1993-12-05 vom geschäftsführenden Direktor, Prof. Dr. Völz, abgegeben. Auf nochmaliges Verlesen wurde verzichtet.

T.O.P. 4: Das Geschäftsjahr 1993 hat mit einem Verlust von DM 525,45 abgeschlossen. Mit der zum 1994-01-01 beschlossenen Beitragserhöhung auf DM 50,00 ist das Erscheinen von grkg/Humankybernetik zunächst sichergestellt.
Prof. Dr. Frank macht den Vorschlag, ähnlich wie bei der AIS, durch Einmalzahlungen lebenslange Mitgliedschaften zu erwerben. Die Mitgliederversammlung beschließt einstimmig, daß das durch folgende Einmalzahlungen erfolgen kann.
Mitglieder über 50 Jahre - Einmalzahlung 15 Jahresbeiträge, Mitglieder unter 50 Jahren - entsprechend dem Lebensalter mehr, maximal aber 25 Jahresbeiträge.

Es wird angeregt, das Mitteilungsblatt grkg/ Humankybernetik an Personen zu spenden, die es sich, insbesondere in reformeuropäischen Ländern, nicht leisten können.

T.O.P.5: Die Berichte werden diskutiert und zustimmend angenommen.

T.O.P. 6: Auf Antrag von Prof.Dr. Frank wird der Vorstand (das Direktorium) für das Geschäfsjahr 1993 einstimmig entlastet.

T.O.P. 7: Als federführender Direktor hat sich schriftlich Prof.Dr. Völz, der wegen einer Kur an der Mitgliederversammlung nicht teilnehmen kann, zur Wiederwahl gestellt. Er wird einstimmig wiedergewählt.

T.O.P. 8: Als stellvertretender Direktor hat sich Prof. Dr. Lehnert schriftlich zur Wiederwahl gestellt, weil er an der Mitgliederversammlung nicht persönlich teilnehmen kann. Er wird einstimmig wiedergewählt. Als zweiter stellvertretender Direktor wird von Frau Dr. Barandovská-Frank Dr. Piotrowski vorgeschlagen. Er wird mit einer Stimmenthaltung (der eigenen) gewählt und nimmt die Wahl an. Frau Dr. Barandovská-Frank wird gebeten, weiter als Schriftführerin zur Verfügung zu stehen. Sie erklärt sich dazu bereit, wofür ihr alle Mitglieder Dank aussprechen.

T.O.P. 9: Dem Institutsrat als dem erweiterten Vorstand gehören aus dem Kreis der anwesenden Mitglieder für 1994 an: Prof. Alsleben, Prof. Dr. Frank, Dr. Vera Barandovská-Frank und Prof.Dr. Weeser-Krell.

T.O.P. 10: Als Kassenprüfer für das Geschäftsjahr 1994 werden einstimmig die Professoren Dr. Frank und Dr. Weeser-Krell gewählt.

T.O.P. 11/T.O.P. 13: Auf Beschluß der Mitgliederversammlung werden diese beiden Punkte zusammengelegt und Prof. Dr. Frank gibt dazu einen Bericht ab:

Die Frage der Kooperation mit der GPI wurde unter Bezugnahme auf die Übersicht über bevorstehende Tagungen (S. 46/47 grkg/ Humankybernetik 1/1994) diskutiert. Die Mitglieder des IfK e.V. sind überwiegend an den Bereichen Informationsspychologie, Bildungskybernetik, Informationsästhetik und (vor allem interlinguistisch orientierter) Sprachkybernetik interessiert. Für diese Gebiete ist die vom Verein getragene Zeitschrift grkg/Humankybernetik führend und auch nahezu darauf beschränkt. Neben sehr speziellen Tagungen, wie z.B. den Stuttgarter Arbeitstreffen Informationsästhetik und den "Prager Konferenzen über kybernetische Pädagogik" werden gemeinsame, periodische Veranstaltungen aller dieser vier Interessenzweige womöglich im größeren Rahmen von Kongressen auch anderer, nahestehender Wissenschaftsgebiete für die interne Kommunikation und die Außenwirkung für notwenig gehalten. Mit dem Vorsitzenden der GPI soll daher vereinbart werden, daß innerhalb der zweijährigen GPI-Kongresse in den Frühjahren 1995, 1997 und 1999 ein programmatisch vom IfK e.V. (mit-)gestaltetes kommunikationskybernetisches Symposion stattfindet, das von den Mitgliedern des IfK e.V. "mit höchster Priorität" besucht werden soll. Die 3-jährigen Kongresse der Association Internationale de Cybernétique kommen wegen der Beschränkung der Kongreßsprachen auf Englisch, Französisch und ILo, unter Ausschluß von Deutsch für die höchste Prioritätsstufe nicht in Frage. Die AIS-Studientagungen sind für diesen Zweck zu häufig.

T.O.P. 12: Außer konkreten Namensänderungsvorschlägen lag die Terminologienotiz in grkg/ Humankybernetik (S. 45, 1/1994) vor. Unstrittig war, den Namen "IfK Berlin e.V." schon aus Traditionsgründen beizubehalten, aber durch einen Untertitel klarzustellen, daß de facto der Verein ein Fachverband ist. Die vertretenen Fächer sollen Bildungskybernetik, Informationspsychologie, Informationsästhetik und Sprachkybernetik (insb. in interlinguistischer Orientierung) sein, einschl. der zugehörigen philosophischen Reflexion. Sowohl durch die Mitglieder als auch durch die von ihnen bezogene Zeitschrift grkg/Humankybernetik, sind die "makro-humankybernetischen" Gebiete Organisations-, Sozial- Staats- und Wirtschaftskybernetik vergleichsweise nur schwach repräsentiert. Da es hierfür spezielle Vereinigungen und Zeitschriften gibt, wird sich daran in den nächsten Jahren kaum etwas ändern können. Es wird eingeräumt, daß die Ausdrücke "Information" oder "Kommunikation" für sich allein die Zielsetzung des Vereins nicht deutlich machen können, da sie weit über die Kybernetik hinaus benutzt werden. Es wird eingeräumt, daß das Wort "Kybernetik" in manchen westlichen Ländern für Unkybernetisches mißbraucht wurde und dadurch an Prestige einbüßte, während es im Osten mit sehr seriösen Arbeiten verbunden blieb, aber als unerfreuliche Begleiterscheinung der "Wende" aufgegeben wird. Es bestand Übereinstimmung, sich von solchen Modetrends nicht beirren zu lassen. Von den vorgeschlagenen Namenszusätzen

1. Gesellschaft für Kommunikationskybernetik,
2. Gesellschaft für Humankybernetik,
3. Gesellschaft für angewandte Kybernetik,
4. Gesellschaft für Anthropokybernetik,
5. Gesellschaft für Kommunikationswissenschaften

sprach sich die Mehrheit für (1), die Minderheit für (2) aus. Alle Mitglieder werden aufgerufen, ihr Votum abzugeben, und zwar in Form einer Präferenzfolge . Präferenz:..., evtl. 2. Präferenz..... usf.) dieser fünf Vorschläge. Das Ergebnis soll bis zum 30. Juli 1994 ermittelt werden. Der Zusatz "Internationale Gesellschaft" wurde nicht befürwortet.

Die Satzung soll durch einen Absatz folgenden Inhalts ergänzt werden: "Außer Mitgliedern aus dem deutschen Sprachraum nimmt der Verein auch aus anderen Ländern Interessierte auf, mit denen in deutscher oder internationaler Sprache (ILo) eine fachliche Kommunikation möglich ist". Bzw.:." mit denen eine fachliche Kommunikation in Deutsch oder in Internacia Lingvo (ILo) möglich ist". Diese Satzungsänderung wurde einstimmig beschlossen.

T.O.P.14: Prof.Dr. Frank berichtete, daß an der Universität Hermannstadt/Sibiu (RO) seit 7 Semestern ein kommunikationskybernetischer Studiengang mit Informatik und Soziologie/Organisationswissenschaft als Beifächern besteht und ein weiterer solcher Studiengang mit linguistischen und interlinguistisch-sprachkybernetikschen Beifächern ab Oktober 1994 geplant ist. Die AIS stellt Lehrkräfte. Durch Initiative von Prof. Dr. Lánský wird Ähnliches zusammen mit der AIS in Nitra (SLK) und Prag (CZ) aufgebaut. Der Verein will nach Kräften eine Zusammenarbeit (mit Studenten- und Dozentenaustausch) zwischen Hermannstadt/Sibiu, Nitra, Prag, Stuttgart, Paderborn, Dresden und Berlin - womöglich mit Einschluß anderer Hochschulorte - fördern.

T.O.P. 15: Anträge und Wortmeldungen lagen nicht vor, so daß die Mitgliederversammlung mit Dank an alle Teilnehmer geschlossen werden konnte.

Siegfried Piotrowski

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/ Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri presspretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.